N-ro 3/2013
25a jaro (2a periodo)



inter ni dirite
- LA JUNULARA FORUMO
Redaktis: Amelie Matt – Muntis: jpa

Det er på tide å planlegge Esperanto-sommeren.
Skal du på landsmøte? Flott!
Har du lyst på mer NJE-aktivitet?
Les artikkelen til høyre og bli med til Brensholmen!
Send gjerne mail til oss om du er interessert. – Og mens du leser dette, blir det ikke lenger mørkt i Tromsø…

*Amelie*

# Kabana semajnfino apud Tromsø en julio

Pasintjare en februaro, NJE aranĝis kabanan semajnfinon en Brensholmen apud Tromsø (legu pri tio en *IND* 2/2012). Ni kunvenis tie sub la norda lumo en la neĝo. 13 junuloj el kelkaj landoj havis amuzajn kaj interesajn tagojn en la nordnorvegia vintro. Tio estis granda sukceso – tiom granda, ke ni nun pensas pri la venonta renkontiĝo tie. Ne vintre kun norda lumo, ŝtormoj kaj glitveturado, sed somere kun nokto-meza suno, banado kaj multaj aktivecoj ekstere!



*Korala plaĝo ĉe la kabano. Fotis: Amelie Matt*



*Nia kabano apud la preĝejo. Fotis: Amelie Matt*

**Kie?**

Brensholmen estas vilaĝeto ĉirkaŭ 60 kilometrojn for de Tromsø. La vilaĝeto havas malgrandan vendejon, lernejon kaj preĝejon. Apud tiu malnovega preĝejo situas la kabano. Ĝi ne vere estas kabano, sed kutima malnova domo de la Universitato en Tromsø, sed oni povas uzi ĝin kiel kabanon. Enhavas dormlokojn por 12 personoj, kuirejon, loĝoĉambron kaj eĉ saŭnon! Dum la vintra renkontiĝo, ni postsaŭne saltetis tra la neĝo, sed somere ni povus salteti tra la akvo en la golfeto. La tagoj estos pli longaj ol vintre. Kiam vi alvenos vendrede kaj foriros dimanĉe, sentiĝos kiel nur UNU tago! La noktomeza suno brilos la tutan tempon, sed kompreneble nur se ne pluvos.

**Kion ni povus fari?**

En la ĉirkaŭo de Brensholmen estas kelkaj montoj kaj montetoj, kiuj bone taŭgas por promeni aŭ montgrimpi. Tie estas multaj videjoj kaj la elrigardo estas belega. Nur kelkajn kilometrojn for de Brensholmen estas malnova fiŝkaptista vilaĝo, kiu nomiĝas Sommarøy. La nomo signifas someran insulon, ĉar tie la sameoj loĝis dum la somero antaŭ kelkaj jarcentoj. Nun, ne la sameoj, sed la tromsøanoj uzas la insulon somere por rostado kaj banado kiam la vetero bonas. Sommarøy ne estas nur unu insulo, sed multaj insuloj kaj insuletoj. Fakte, antaŭ du-tri jaroj oni povis aĉeti Lille Sommarøy, la najbarajn insulojn, por kelkaj milionoj da kronoj. Mi bedaŭrinde ne havis sufiĉe da mono en mia ŝparejo – kaj ankaŭ ne havas ŝipeton por iri tien.

Sommarøy havas blankajn koralplaĝojn, puregan akvon kaj belegan elrigardon. Ĉu ni bezonas pli? Jes, sunbrilon kaj varman temperaturon. Tion mi kompreneble ne povas garantii, sed mi mendis belegan veteron.



*Vilaĝeto Brensholmen. Fotis: Amelie Matt*

**Kiam?**

Ni pensis pri la semajnfino 05.-07.07.2013, sed ankaŭ aliaj semajnfinoj eblas. Mi ankoraŭ ne mendis la kabanon, ĉar antaŭe ni bezonas scii, kiuj kaj kiom da esperantistoj volas partopreni. Se ni estos pli ol du aŭ tri, estos pli malmultkoste por la kabano kaj la etoso pliboniĝos! Bv. inviti aliajn esperantistojn, membriĝi en nia vizaĝopaĝa aranĝo "Kabana semajnfino sub la noktomeza suno" kaj skribi (vizaĝpaĝe aŭ retpoŝte) al mi, se vi interesiĝas. Ĝis revido en Brensholmen!




© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com